ESPERANTO EN AFRIKO

Bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

Numero 19 (2013: 1)

Karaj gelegantoj,

La jaro 2012 jam finiĝis. Riĉa je eventoj ĉiuspecaj, tiu jaro estis bela okazo por montri la viglecon kaj diversecon de la movado en Afriko: okazis multaj eventoj por la jubileo de Esperanto, kursoj en Benino, Burundo, Senegalo ktp. Tiu ĉi estas la unua apero de nia bulteno dum la jaro 2013. Denove en ĝi abundas raportoj, intervjuoj, vidpunktoj ktp. Grava internacia renkontiĝo prepariĝas por Benino je la fino de la jaro 2013. Agrablan legadon al ĉiuj.

La redaktoro

***

VORTO DE LA KUNORDIGANTO DE AK

Karaj afrikanoj, karaj geamikoj,

Nome de la Afrika Komisiono de UEA, mi bonvenigas vin al la nova jaro 2013! Tiu ĉi mia mesaĝo celas danki vin pri via diversa laboro en Afriko, kaj pri la entuziasmo, kiun atestas via agado en la finiĝinta jaro.

Se reveni al la laboro por Esperanto, certe tiu jaro markis evoluon en la afrika movado pli ol en la jaro antaŭe. Ni provis sukcese disvastigi Esperanton al la landoj, kie ĝis nun ĝi ne ekzistis (ekzemple Burkino, kaj tiel multe plu); elpaŝis pri Esperanto en altlernejoj kaj universitatoj; aranĝis lokajn kursojn, ĉeestajn kaj perkorespondajn; starigis ankaŭ en Afriko la tradicion pri la Zamenhof-tago... sen forgesi mencion pri multaj eventoj, kiuj iniciatiĝis tra la jaro kadre de la 125-jariĝo de la lingvo.

La evoluoj kiuj rimarkiĝis en 2012 plu daŭros en 2013. Ĉiu pli prenu la respondecon rilate al la disaŭdigo de Esperanto en nia kontinento. Ni devos dediĉi nin al plia stimulado de Esperanto en Afriko. Ni sukcesos per kunlaborado inter ni, inter ni kaj la simpatiantoj de la Afrika-movado, laŭ la idealoj de Zamenhof.

Kiel sciate, multaj agadoj en Afriko anonciĝas en 2013, i.a la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto. Post 17-jara paŭzo, Afrika Kongreso denove realiĝos jarfine de 2013 en Kotonuo, Benino, danke al la kunlaboro kun la neregistara organizo Scio Sen Bariloj kaj la Benina Asocio ABeE. Tia kongreso servos diversflanke. Ĝi donos eblon al afrikanoj konigi siajn kulturojn almenaŭ al eksterafrikaj esperantistoj kiuj venos. Ĝi donos eblon, altgrade konigi la internacian lingvon al beninanoj. Dum tiu kongreso oni ankaŭ parolos pri instruado kaj pri mastrumado de Esperanto-organizaĵoj.

Por ke la Esperanto-movado en Afriko estu forta, tamen, ne nur sufiĉas granda tutafrika renkontiĝo. Gravas la ĉiutaga laboro de ĉiuj unuopaj afrikaj esperantistoj, kluboj kaj landaj asocioj en siaj regionoj. La landaj asocioj diskutu realajn problemojn de la kluboj kaj helpu por trovi solvon. Ĝi organizu seminarion por ke la membroj edukiĝu lingve kaj movade. La landaj asocioj provu trovi respondeculon kiu zorgos pri la projekto Ĝemelaj Urboj kunlabore al la komisiito de UEA s-ro Wu Guojiang, kies retadreson havigos la Afrika Oficejo.

La afrika movado ankoraŭ ne estas en la situacio en kiu kluboj vivas per la kotizoj de la klubanoj. Ĉiuj lokaj kluboj, landaj asocioj devas labori por tio, por ke tio fariĝu ankaŭ en Afriko la kutimo. La ekzemplo de Burundo estas citinda tie ĉi. Estas tasko, ke ĉiuj afrikaj landaj asocioj trovu manierojn por havigi financan sendependiĝon de la lokaj kluboj. Esperanto restos en Afriko, kondiĉe ke ni ebligos tion finance.

Mi bondeziras, ke la nova jaro 2013 alportu al vi kaj via familio pacon, trankvilon, bonfarton kaj plensukceson en viaj projektoj!

Adjévi Adjé, ĉefkunordiganto de AK

AFRIKA MOVADO: ĈU PROGRESO AŬ ETERNA REKOMENCO?

Al tiu demando tute simpla estas multfacetaj respondoj, depende de tiu al kiu oni ĝin faras. Por iuj, precipe tiuj kiuj sin konsideras kiel pionirojn de la movado en Afriko, la movado stagnas, eĉ malprogresas. Por aliaj kiuj apenaŭ konas la menciitajn pionirojn, la movado ĵus naskiĝis kaj progresos danke al ili. La pioniroj riproĉas al aliaj afrikanoj, ke ili tro dependas de eksterafrikanoj, ĉefe de eŭropanoj. Ili proponas ke afrikanoj aranĝu eventojn sen nepre atendi ian helpon de eksterafrikanoj. Tamen, preskaŭ neniun eventon tiuj aranĝis sen minimuma helpo el ekster Afriko. Je eksterlanda vidpunkto, respondo al la sama demando varias laŭ tiu al kiu oni ĝin faras. Ĉu fakte kulpas la helpo en si mem? Tre verŝajne ne, kvankam ĝi povus kontribui al la situacio. Tamen la ĉefa ero de kulpigo estas manko de fundamenta demando rilate al celo de Esperanto por afrikanoj. La sinteno de eksterafrikanoj, ĉefe de eŭropanoj, vid-al-vide al Esperanto ofte ne similas al tiu de afrikanoj. Hobio ĝi estas por iuj, dum por la aliaj ĝi estas bela okazo, ĉu por eliri malfacilan vivsituacion, ĉu por konatiĝi kun la ekstera senzorgoplena mondo. Tiu daŭra serĉado por plibonigi propran vivkondiĉon ne estas io tipa por afrikanoj, sed por ĉiuj homoj, egale de kiu kontinento ili devenas. Se oni prezentas Esperanton kiel ilon por pacigi aŭ semi grejnon de interkompreniĝo en la mondo, kompreneble interesintoj tuj rimarkas ke ofte esperantistoj ne tiom interkomprenas pri kelkaj simplaj aferoj. Oni nur bezonu sekvi interŝanĝojn de mesaĝoj ĉe diskutlistoj por konfirmi tian aserton. Abundas multaj ekzemploj pri tio en Afriko: homoj eĉ fariĝis malamikoj pro Esperanto. Aldone al tiu senkonvinka argumento, estas tiu rilate al konatiĝo kun la ekstera mondo, precipe kun tiu de Okcidento. Tiu lasta argumento estas tiu kiu kaptas atenton de multaj homoj en la Tria Mondo. Malfeliĉe en la okcidenta mondo, kvazaŭ la Unua Mondo, ne abundas tiom da homoj por nutri tian esperon atingi la paradizan teron. Indas konfesi, ke kelkaj homoj afrikaj, eble tre malmultaj, tamen havas sukcesplenan vivon danke al helpo de esperantistoj. Nun, reen al la ĉefa demando: ĉu la movado en Afriko progresas. La respondo estas jesa pro jenaj kialoj: hodiaŭ ekzistas strukturoj tute gvidataj de diversaj afrikanoj, ne de unusola homo. Ties membroj volonte petas helpojn ĉiuspecajn de eksterafrikanoj por funkciigi ilin. Kiam oni petas helpon, precipe financan, estas ja kondiĉo respektenda. La afero tute similas al tiu de lando en malfacila financa situacio ĉie en la mondo, ĉu en Grekio, ĉu en Usono.

Peto de helpo el eksterlando por funkciigi la movadon en Afriko ne estas malbona en si mem. Tio kio vere malhelpas la movadon en Afriko estas ke unuflanke multaj afrikaj esperantistoj serĉas prestiĝon kaj famon pere de la movado, kaj sekve la komunikado sincerplena tre suferas pro tio. Similan prestiĝon deziras atingi kelkaj eksterafrikanoj, kiuj pere de sia agado intencas iĝi tre famaj. Dua argumento de mia aserto estas ke multaj homoj agadas ekster la oficiala kanalo de lokaj kaj internaciaj Esperanto-instancoj. Abundas ekzemploj pri tiaj agadoj, i.e agado de iuj esperantistoj kiuj funkciigas orfejon aŭ lernejon en Afriko. Ke la movado en Afriko ekzistu sub diversaj kanaloj estas beno, ne malhelpo. Homoj, ĉu eksterafrikanoj, ĉu afrikanoj, kiuj faras al si zorgojn pro tia diverseco, estas eble tiuj kiuj pensas ke sen specifaj homoj, la movado ne progresos en Afriko. Kiuj riproĉas troan dependiĝon al eksterafrikanoj, tiuj bonvolu ekkontribui finance al buĝeto pri funkciado de sia loka asocio. Ĉar la plimulto de komencantoj en afriko estas gestudentoj, ili verŝajne ne partoprenos en internaciaj aranĝoj aŭ en instruseminarioj sen ia helpo financa.

Pro la vivkondiĉo de multaj esperantistoj en Afriko, kluboj suferas pro manko de kotizo de ties membroj. La demando estas: ĉu ili vere ne povas kotizi per modesta financa kontribuo? Povus esti, ke kelkaj efektive ne kapablas kontribui, sed la plejmulto ja povas. Tamen, ekzistas malmulte da lokaj grupoj aŭ asocioj kies estraranoj kunvenas sen subvencio de UEA. La afero tiel funkciis eĉ dum la supozata sukcesplena periodo de la movado en Afriko, eĉ pli bedaŭrinde ol tiu de hodiaŭ. Estis la periodo dum kiu unusola homo gvidas tutan afrikan movadon, kaj sekve la Esperanto-komunumo rigardas tutan kontinenton tra okulvitro de unusola homo. Eble estis iu avantaĝo pro tio, tiu de kvazaŭa stabileco. Tamen longdaŭra sukceso de iu ajn entrepreno dependas de diverseco kaj varieco de vidpunktoj de ties gvidantoj aŭ membroj.

La movado en afriko certe evoluos sendepende de opinioj kaj de sinteno de afrikanoj kaj eksterafrikanoj. Afrikanoj ne iru pli rapide ol la veturilo en kiu ili troviĝas. Ili ne nepre sekvu modelon de homoj kiuj vivas en medio kelkfoje malsimila al tiu al kiu ili kutimas. Por ke Esperanto enradikiĝu en Afriko, afrikanoj tamen devu investi tion kion ili ofte pli havas: tempon, energion kaj eventuale monon. La tradicia vivmaniero en multaj afrikaj etnaj komunumoj jam spektas tion. Tio ja ne signifas, ke ili devu fermi la pordon al helpo el Eŭropo. Pagipovaj afrikanoj povas helpi aliajn nepagipovajn, samgrade kiel homoj eksterafrikaj kiuj pagas por membrigi ("kanutigi") multajn afrikanojn, partoprenigi afrikanojn en internaciaj aranĝoj (Fondaĵo Afriko ktp.). Por fini, afrikanoj konsciu, ke ili devus sincere komuniki unu kun la alia en tute amika etoso, kun la akcepto ke diverseco de opinio ja estas bona por iu ajn entrepreno.

Jean Codjo, membro de AK

ZAMENHOFA TAGO

- **Togolando**

La 16-an de decembro 2012 okazis memor-renkontiĝo pri la 153-a naskiĝtago de Zamenhof en la togolanda ĉefurbo, Lomeo. La evento duafoje gastis en la domo n-ro 692 en Nukafu; ĝin organizis Asocio por Progresigi Esperanton en Togolando (APETo). Partoprenis 23 homoj: 1 ĉino, 1 hispanino kaj 21 togolandanoj. Ĉi-jare la festo laŭ sia enhavo klare dividiĝis al labora kaj distra partoj. En la unua parto

estis ĝenerala kunsido de APETo, en kiu oni parolis pri la agadoj en la kuranta jaro kaj pri tiuj en la tuj komenciĝonta jaro. Okazis ankaŭ prelegoj: Kouevigan Koffi Jérome, la prezidanto, brile prezentis pri la vivo de Zamenhof, ĉina e-isto Zhu Minĝe prelegis pri la internacia komerco, kaj siavice Nouwoatsi Kossi Sénam gvidis diskuton pri la "solidareco". Dum ĉi-lasta ero, ĉiuj ĉeestantoj provis prezenti sian komprenon kaj koncepton pri la temo, kaj sekvis viglaj interŝanĝoj pri ĝi.

Aliflanke, la organizantoj faris unu surprizon: ili disdonis al ĉiuj kalendarojn 2013 de franca junulara organizaĵo, kaj krome la novuloj ricevis flugfoliojn pri Esperanto kaj unuan folion de la kurso de sinjoro Hubert Ferez. Poste okazis en la beleta ĝardeno gustumado de refreŝigaĵoj kaj de tipaj afrikaj manĝaĵoj lerte kuiritaj de "ĉefoj". La distran parton kompletigis en bonaj kondiĉoj ĉe vesperiĝo filmo pri la esperantista vivo de Zhu.

La tago estis memorinda pro du aferoj: la unua datreveno de APETo, kaj la koincido de la aranĝo en la domo kun kunveno de la membroj de la hispana organizaĵo "Baobab", kies loka ĉefkunordiganto estas esperantisto Tete-Badu Nyinévi. Ĉi tiu grupo, plejparte gestudentoj de la universitato de Lomeo, ankaŭ ricevis informojn pri nia komuna lingvo.

La renkontiĝo estis pli ol kontentiga. Unue, ni havis trilandan partoprenantaron kiel antaŭvidite, kaj ni komune sukcesis krei nekredeblan, vere internacian impreson de amikeco. Due, Esperanto atingis grandan nombron de homoj inkluzive la grupon de Baobab. Estis interese vidi kiel esperantistoj lerte praktikis la lingvon en la tradukado de la franca al Esperanto kaj de Esperanto al la franca, kaj ĉi jare brile montriĝis en tiu arto s-ro Kouevi Ekoue Mawuto. Li kun helpo de Adjévi Adjé tradukis ĉiujn prezentojn. Sinceran dankon al li kaj aliaj, kiuj helpis por ke niaj neesperantistaj gastoj povu sekvi kaj kompreni la prelegojn, kio kontribuis al la rego de bonega etoso.

Ankaŭ aŭdiĝis dum la aranĝo mencioj pri la 20-a Togolanda Esperanto-Kongreso, kiu okazis unuafoje en Lomeo de la 21-a ĝis la 22-a de decembro 2012, kaj instigoj de homoj aliĝi al ĝi. Unua rezulto: du partoprenantoj pagis sian kongresan kotizon.

En la venonta jaro ni ankoraŭ festos, espereble, kun pli multaj virinaj partoprenontoj kaj invito al ĵurnalistoj se nia financostato ebligos tion... sed se vi jam intencas viziti Togolandon, kio tre ĝojigus nin, bonvolu kontakti nin kaj ni organizos vian alvenon. Estus interese, se vi venus kaj prelegus pri via hejmlando aŭ fako dum unu el la aranĝoj de APETo venontjare.

Adjévi Adjé

- **Benino: speciala Zamenhofa Tago en beninaj lernejoj per svisaj donacoj**



Sabaton, la 22-an de decembro 2012, gelernantoj de Esperanto en du beninaj ŝtataj mezlernejoj festis la Zamenhofan Tagon. Temis pri mezgrada lernejo en la vilaĝo Ayahohoué (Ajahohue) matene, kaj mezgrada lernejo n-ro 1 en la urbo Azové posttagmeze. En ambaŭ lokoj la feston mi aŭspiciis. En la komenco mi klarigis al festantoj, ke la tago estas festata ĉie en Esperantujo memore al la naskiĝtago – la 15-a de decembro – de la kreinto de la lingvo Esperanto, d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ne mankis Ĥora kantado de la himno de Esperanto "La Espero", kio antaŭis tiun klarigon. Poste mi rakontis al la ĉeestantoj pri la vivo de "D-ro Esperanto" kaj lia familio. Resume la okazo ebligis al ili scii pri Markus Zamenhof kaj Rozalja Sofer (gepatroj de Ludoviko), Klara Zilbernik (lia edzino, kiu multe helpis lin diskonigi la Unuan Libron), Sarah, Fania, Augusta, Félix, Henri, Léon, Alexandre, Ida (gefratoj liaj), kaj

Adamo, Sofio kaj Lidja (liaj gefiloj). Ankaŭ ties fotojn ili vidis dank' al bildaro el la libro *La vivo de Zamenhof* de Edmond Privat, kiun mi kunportis por la okazo. Se la tago iĝis speciala, la precipa kaŭzo kuŝis tie, ke tri tagojn antaŭe mi ricevis pakaĵon senditan de s-ino Mónika Molnár kadre de nia multjara interlerneja korespondado. La sendaĵo konsistis el leteroj kaj donacoj (krajono, skrapgumo, ĉokoladoj) de esperantistaj lernejanoj el *École de la Grande Ourse* (Lernejo Ursino) en Ĉaŭdefono (Svislando) al iliaj leteramikoj en la du beninaj lernejoj, kaj de esperantaĵoj (*Juna Amiko*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *Monato*, *Esperanto*, libroj kaj ĉokolado) de Mónika Molnár mem. Plej interesa kaj amuza estas la adventa kalendaro, kiun Mónika donacis. Temas pri rektangula skatolo, kiu numeriĝis de 1 ĝis 24. Nun ĉiu lernanto rajtas elekti numeron kaj premi ĝin. Malantaŭ ĝi troviĝas unu lakto-ĉokolado por la elektanto. Kelkvorte la skatolo konsistas el 24 ĉokoladoj kaj Mónika sendis 2 tiajn kalendarojn, do entute 48 ĉokoladojn. Ni bone dividis ilin inter ni ĉiuj. La dolĉaĵoj de Malou al lia amiko Halk Bello kaj ties Esperanto-klasanoj ne estis prisilentitaj. Krome, mi uzis la okazon por disdoni al miaj lernantoj kelkajn ricevitajn revuojn. Tiamaniere Mónika Molnár kaj ŝiaj gelernantoj festis, sed sen fizika ĉeesto, kun siaj beninaj gesamideanoj! Lastan dankon mi volas direkti al s-ino Mónika Molnár pro la sendaĵo.

Latifou Gbadamassi (kursgvidanto)

AGADE TRA AFRIKO

• Senegalio: raporto pri kurso kaj sesio en Rufisko

Tiu kurso kaj sesio estis organizitaj de Scio Sen Bariloj (SSB) kune kun Senegala Esperanto-Asocio (SEA). Subvencioj venis de Esperanto Internacia kaj de privata mecenato. La plano estis du tagoj kun kurso kaj du tagoj por ekzamensesio. Ĉar la prezidanto de SEA, s-ro Assane Faye, sendis invitojn al la urbaj instancoj kaj amaskomunikiloj por solena malfermo, tiu ceremonio okupis la posttagmezon de la 29-a de decembro kaj la kursoj daŭris tri duonajn tagojn.

La plano estis komence okazigi sesion kun la elementa nivelo de Internaciaj Ekzamenoj de ILEI. Post la sperto en Kotonuo, kie multaj kandidatoj ne sukcesis en tiu tute ne elementa nivelo, estis proponite al Assane Faye okazigi en Rufisko la sojlan nivelon akceptitan de Internacia Ekzemena Komisiono (IEK). Assane konsentis. Ekde aprilo 2012 estas diskutoj ene de ILEI por modifi la ekzamensistemon. Agadas laborgrupo. Kiam venis propono al la prezidanto de ILEI fari en Rufisko la sojlan nivelon, li sugestis, ke ni tuj alprenu novajn nomojn por ĉiuj tri niveloj. Bonega ideo! Modifi post enkonduko estus pli malfacila afero. Pro tio ni havis en Rufisko premieron: la unuan sesion de tiu tute nova "Unua Nivelo" (UN). Ekzistas nun apude Dua Nivelo (DN; antaŭa nomo: elementa) kaj Tria Nivelo (TN; antaŭa nomo: meza).

Partoprenantoj

Aliĝis 32 personoj al la kurso. Tiu grupo fakte entenis tri subgrupojn. La plej altnivela subgrupo konsistis el la plej altnivelaj esperantistoj en Senegalo, tiuj, kiuj kutimas instrui. La plej granda parto estis subgrupo el lernantoj de ili. En tiu grupo multaj eklernis Esperanton dum la jaro 2012, tio estas, ke la okazigo de la kurso kaj sesio, decidita antaŭ unu jaro, multe stimulis la homojn en la lando. La tria subgrupo estis interesatoj sen iaj scioj, ofte amikoj de la jam komencintoj. Ili kuraĝe sekvis la kurson kaj aliĝis al la ekzameno. Tamen ilia bezono estus la kurso Unua Kontakto. Konsekvence la instruisto Mirejo devis adapti sian instruadon al tiu situacio kun tre malsimilaj lingvokapabloj en la klaso. Ŝi klopodis. Ŝi donis stimulon al ambaŭ ekstremoj de tiu grupo kaj

klopodis konservi la motivigon de ĉiuj. Tiu situacio klarigas la rezultojn: la tutkomencantoj ne sukcesis en la ekzameno.

Rezulto de la sesio

Aliĝis 32 personoj, kiuj sekvis la kurson kaj aliĝis al la ekzameno. Partoprenis en la ekzameno 29 personoj. Post la skriba parto ni konstatis, ke kelkaj kandidatoj, la komencantoj, ne povos sukcesi entute (skriba kaj parola partoj), eĉ se ili estus elstaraj en la parola parto. Tion ni anoncis al ili kaj klopodis klarigi afable por ne detrui ilian motivigon. Tio koncernas 10 personojn. Fine de la parola parto ni devis konstati ne grandan sukceson. Laŭ la regularo la sukceslimo estas 60% el 150 poentoj. La Loka Ekzamena Komisiono decidis malaltigi la sukceslimon al 50%. Rezulto de tio estas, ke la malsukcesintoj estis nur 3 kandidatoj inter la restantaj 19. Inter la sukcesintoj estis 11 kandidatoj kun mencio "kontentige", 2 kandidatoj kun mencio "bone" kaj 3 kandidatoj kun mencio "tre bone". Tiuj tri personoj estas la instruistoj. Neniu atingis la maksimumon de 150 poentoj; tio signifas, ke nia elekto proponi sesion Unua Nivelo estis adekvata decido. Notindas la partopreno de 2 junulinoj ene de la 32-persona grupo.

La Loka Ekzamena Komisiono decidis doni al ĉiu atestilo numeron. Konsekvence ni disdonis la atestilojn 001 ĝis 016 en Rufisko. La numero aperas sur la atestilo tiel: N° 00001 / ILEI / UN [DN, TN] / 2013. La venonta sesio estos laŭ la nunaj informoj la sesio en aprilo en Barcelono, Katalunio. Tie ni devos komenci per la atestilo numero 17.

Rimarkoj

Alia eblo estus en tia kazo: en alia loko per la kunlaboro de dua instruisto improvize enkonduki kurson Unua Kontakto por la komencantoj. Tion ni ne povis fari.

La solena inaŭguro multe impresis la partoprenantojn. La paroladoj en la franca lingvo estis komprenataj de ĉiuj, de la komencantoj same kiel de la reprezentantoj de la urbo kaj de la gazetaro. Plie en la paroladoj venis argumentoj kaj faktoj, kaj la senegalanoj povis ekscii pri tio kaj povos plu uzi tion.

La gastiganta Nacia Centro por Lertigado kaj Agado en Rufisko havas bibiotekon. Tie ni donacis dosieron pri Esperanto, vortaron kaj lernolibron en la franca lingvo. Pliaj libroj sekvos per poŝto.

Ĉar Mirejo parolis en Dakaro ĉe radio Al Madina vendredon vespere dum 45 minutoj por registri elsendon por dimanĉe je la dekunua horo, ni decidis interrompi la instruadon kaj ebligi al ĉiuj sekvi tiun intervjuon. Tion ni faris. La temoj de la intervjuo estis afrikaj aspektoj, cirkonstancoj, kaj Esperanto. Tiu intervjuo vekis grandan intereson kaj debato sekvis en vigla etoso.

Dum la solena malfermo kaj dum la disdono de atestiloj ĉeestis la direktoro de la Centro s-ro Sy kaj reprezentantoj de la amaskomunikiloj. Aperis artikolo en gazeto, aŭdiĝis elsendoj ĉe radioj, kaj vidiĝis programo duminuta tre bonkvalita en la ŝtata televido dum la ĉefa novaĵprogramo vespere en la 31-a de decembro, ĝuste antaŭ la oficiala parolado de la ŝtatestro.

Ĉar Mirejo ricevis lernolibrojn, vortarojn kaj informilojn ĉe UFE kaj SAT-Amikaro en Parizo, ŝi unue sendis kelkajn per poŝto por ebligi bonan laboron kaj preparon. La plej grandan parton, proksimume 12 kg, ŝi alportis kaj disdonis komence de la kurso. Ĉiu partoprenanto nun posedas sian propran vortaron. Aldoniĝis ekzempleroj de *Juna Amiko*, *Literatura Foiro* kaj *Internacia Pedagogia Revuo*. Informiloj en la franca kaj kalendaretoj ne mankis.

Nia kurso kaj sesio okazis en Nacia Centro pri Lertigado kaj Agado, kie la dudek gestudentoj povis tranokti. En tute apuda domo tranoktis la ekzamenantoj. Komunaj bongustegaj manĝoj kontribuis al la kontentiĝo de ĉiuj. El tio rezultiĝis bonega etoso en proksimeco kaj interŝanĝo de ideoj, spertoj, scioj, opinioj. Nia staĝo estis *gasŝuku* en la japana lingvo, kutime tradukita per "studcela kunloĝado".

Granda danko iru al la prezidanto de SEA s-ro Assane Faye kaj al liaj kolegoj, kiuj bonege organizis la tuton.

Mireille Grosjean

• **Benino: la lernejo Jules Verstraeten pli internaciiĝas**

De 2002 mi kutime vizitas Beninon pro du ĉefaj kialoj: familia kaj Esperanta. Mia vojaĝo ofte okazas dum la somero, sed de du jaroj mi tien flugas jarfine pro flugbileta kosto. Krome, estas bela okazo por eskapi la kanadan malvarmon. Tamen, la restado daŭras nur iom malpli ol du semajnojn. La Esperanta flanko de la vojaĝo rilatas al la Afrika Oficejo de UEA kaj precipe al la lernejo Jules Verstraeten.

Ĉi-foje, mia alveno la 25-an de decembro instigis la lernejestron malfermi pordon de la lernejo, por ke mi kaj Pierre gvidu aktivecon rilate al interŝanĝo inter geknaboj de la sesa klaso de la lernejo kaj tiu de École Camille-Vautour, mezgrada lernejo en Kanado. La ideo naskiĝis antaŭ kelkaj monatoj, kiam instruistino de tiu lernejo petis tian interŝanĝon kun iu lernejo en Afriko. Verdire, ŝi ne povis imagi diferencon inter la du realecoj: tiu en la vilaĝo kaj la ŝia en Kanado. Ŝi petis interŝanĝon pere de retmesaĝoj kaj eventuale de Skajpo, dum mi devis klarigi ke en la vilaĝo kie staras la lernejo, ne estas kurento por ebligi ion tian. Kompreneble tiu diferenco de realeco pli instigis la gelernantojn kanadajn inventi strategion por korespondi kun tiuj en Benino. Ili sendis unuan pakaĵon de leterojn al Benino, sed post sep semajnoj, ĝi ankoraŭ ne atingis la lernejon. La duan pakaĵon ili sendis pere de mia kutima ĉiujara vojaĝo. Tiel peza ĝi estis, ke mi estis devigata aldoni kroman valizon. La valizo enhavas lernmaterialojn, skribilojn, ludilojn ktp. Koston de tiu valizo la kanadaj geknaboj transprenis. Gelernantoj de la sesa klaso de Jules Verstraeten vere estis feliĉaj pro la donacoj. Ili kaptis la okazon por skribi leterojn kiujn mi kunportu al iliaj geamikoj en Kanado.

La dua grava aktiveco dum mia vizito en la lernejo estas instigi la infanojn de la unua klaso desegni pri la temo "rilato inter gemaljunuloj kaj infanoj". Iuj desegnis pri kiel geknaboj helpu geavojn, dum aliaj pri kiel gemaljunuloj transdonu vivspertojn al gejunuloj. La sesa klaso de la lernejo ankaŭ partoprenis en tiu aktiveco. La desegnaĵoj estos uzataj por skribi libreton pri kiel gejunuloj el diversaj kulturoj rilatas al gemaljunuloj. La ideo naskiĝis ĉefe el interŝanĝoj de mesaĝoj inter Sabine Hauge, esperantistino kaj ĉefa mecenatino de la lernejo, kaj mi. Kelkaj iamaj gelernantoj de Jules Verstraeten kaptis la okazon por fari amatoran filmeton, kiu estas alirebla je jena adreso ĉe YouTube: http://www.youtube.com/watch?v=BXPQ7RZNtKY aŭ oni povas serĉi per "mesaĝo al GEK2013 el Benino" ĉe YouTube.

Jean Codjo

INTERVJUO KUN VOLONTULO ĈE AO

Bernard estas unu el la du oficialaj volontuloj de la Afrika Oficejo de UEA. Li ankaŭ estas unu el la geknaboj kiuj frekventis la lernejon Jules Verstraeten, kie oni instruas Esperanton. Se Bernard sukcesos al ekzameno de bakalaŭro, li estos unu el la du geknaboj de la vilaĝo kiuj daŭrigos universitatan studadon ekde oktobro 2013.

Esperanto en Afriko: *Saluton Bernard. Ĉu eble vi mem povas prezenti vin pli detale al niaj legantoj?*

Bernard: Jes,mia nomo estas Bernard Gnancadja. Mi estas unu el la geknaboj kiuj frekventis la lernejon Jules Verstraeten de Kodji, kie oni lernas Esperanton jam ekde la jaro 1999. Mi daŭrigas mian studadon kaj baldaŭ ĉe la nacia universitato. Mi aĝas dek naŭ jarojn.

Esperanto en Afriko: *Esperanto certe ludas gravan rolon en via vivo, sed ĝis kiagrade?*

Bernard: Vere, Esperanto ludas gravan rolon en mia vivo. Sen ĝi, mi eble ne povis iri al lernejo, ĉar pro helpo de esperantistoj mia vilaĝo havas lernejon. Krome, mi povis daŭrigi ĉe la mezlernejo pro financa helpo de esperantistoj.

Esperanto en Afriko: *Mi komprenas, ke sen helpo de esperantistoj, ĉefe el Germanio, lernejo ne estus en via vilaĝo. Kion alian vi estus farinta, se tiu lernejo ne ekzistus?*

Bernard: Kiel mi jam menciis, sen tiu lernejo, mi certe ne povis studi ĝis nun. Eble mi lernus ian metion kiu ne donus eblecon havi decan vivon en la estonteco.

Esperanto en Afriko: *Nun, vi deĵoras volontule ĉe AO de unu jaro. Ĉu estas ia specifa avantaĝo por homo kiu deĵoras ĉe AO?*

Bernard: Laŭ mia opino estas pluraj avantaĝoj, kiel: havi aliron por komptiluzado, gajni monon por kovri financajn bezonojn, kaj scii kiel funkcias la movado en aliaj landoj, ĉar mi devas legi raportojn, konscii pri kiel funkcias la internacia strukturo ktp. Spertoj akiritaj ĉe AO certe helpos min en la estonteco.

Esperanto en Afriko: *Kiajn malfacilaĵojn vi alfrontas deĵorante ĉe AO?*

Bernard: Respondi negative al peto de homoj. Venas multaj petoj, kiujn AO ne kapablas plenumi. Ekzemple peto de giganta kvanto da mono aŭ de aparato multekosta.

Esperanto en Afriko: Vi ankaŭ estas provizora prezidento de la benina junulara sekcio (BOJE). Ĉu vi havas ian planon por vivgligi la movadon en Benino?

Bernard: Certe jes. Post la elekto dum la provizora asembleo de BOJE, mi deziras ke la movado en Benino povu pli vigle komuniki kun la Esperanto-komunumo. Por atingi tion, necesas informi daŭre pri konkretaj agadoj. Sub mia gvido, BOJE partoprenis al filmkonkurso organizita de la Germana Esperanto-Asocio. BOJE nun pli uzas ilojn modernajn por komuniki al la tuta mondo. Ekzemple, mesaĝo al kongreso germana estas legebla ĉe youtube: http://www.youtube.com/watch?v=BXPQ7RZNtKY. BOJE ankaŭ intencas fari ĉemizojn kun simbolo de Esperanto. Mi baldaŭ relanĉos preparon por asembleo dum kiu definitiva estraro estos elektita.

Esperanto en Afriko: Ekde oktobro 2013 vi verŝajne ekstudados ĉe la nacia universitato de Benino. En kiu fako vi intencas studi?

Bernard: Historio kaj geografio.

Esperanto en Afriko: La bulteno de la Afrika Komisiono dankas vin pro via preteco akcepti tiun intervjuon.

Bernard: Nedankinde. ✪

Komentojn, konsilojn, sugestojn kaj raportojn pri okazintaĵoj en via urbo aŭ lando bv. sendi al la redakteja adreso: afrika.oficejo@gmail.com, aŭ aerpoŝte al:

Afrika Oficejo, B.P. 416, Lokossa-Mono, Benino

tel./fakso: +229 224 10 229